

La Riverego

Printempo de 1999

Esperanto-Societo Kebekla

N^o54^o, Jaro 14^o

Ideo ligita al juneco

Henri Masson

Une *courte* recension d'espérantistes célèbres, ayant appris l'espéranto dans leur jeunesse, voire leur enfance. D'entrée de jeu, on mentionne que l'espéranto, seul projet réussi de langue planifiée, est aussi le seul à avoir été créé par un jeune...

En la longa historio de la ideo de universala lingvo, tiu kiun mi uzas nun estas escepto. Neniu alia ol ĝi sukcesis venki amason da obstakloj. Inter la iniciatintoj de pli ol 600 projektoj aperas ke neniu, escepte de Zamenhof, estis juna, kaj ke estis nur unu virino — abatino Hildegardis (1098-1178). Kiel frua poligloto, Zamenhof multe ŝatis lingvojn, sed li jam havis sufiĉe klaran vidon por konscii ke plej taŭga solvo de la problemo de interkompreniĝo troviĝas ne en ĥaosa plurlingveco, sed en lingvo pli facila kaj komuna al ĉiuj homoj.

Zamenhof estis deknaŭ-jara kiam li prezentis unuan projekton sub la nomo *Lingwe Uniwersala*. Pro tio venis al mi la ideo iom esplori kazojn de homoj lernintaj Esperanton junaĝe, ĝuste ĝis la deknaŭa jaro, kaj kiuj sukcesis en la vivo, famiĝis aŭ meritis grandan estimon. Estas utile precizigi ke sukceso ne estas por mi sinonimo de monavido aŭ samtipa mensmalsano.

Gustav Ramstedt (1873-1950) lernis Esperanton 18-jara en 1891 kaj estis inter la unuaj Esperantistoj de Finnlando. Li fariĝis profesoro pri

lingvoscienco kaj mondfama filologo, ministro kaj ambasadoro de Finnlando en Japanio kaj Ĉinio. Esplorvojaĝojn li faris en Mongolio kaj Ĉinio, kaj li multe subtenis Esperanton en Japanio.

Edmond Privat (1889-1962) lernis

Esperanton nur 13-jara kun samklasano Hector Hodler. Profesoro de angla lingvo kaj literaturo, li estis tre ŝatata de siaj studentoj en la Universitato de Neuchâtel, en Svisio. Li estis delegito

sekvo...

Un appel toujours valide...

Henri Masson

Au début de la Première Guerre mondiale, Hector Hodler, fils du fameux peintre suisse Ferdinand Hodler, lança un appel qui continue d'être valide dans les circonstances actuelles. Il mérite une traduction dans toutes les langues et une diffusion aussi vaste que possible dans les médias et les établissements d'enseignement. Il parut sous le titre *Super* (Au-dessus de...) dans *Esperanto* du 5 janvier 1915 dans la Langue Internationale qu'il avait apprise comme lycéen à l'âge de 16 ans et dont il fut l'un des pionniers en Suisse.

« Nous avons le devoir de ne pas oublier... À côté de nos sympathies, nous avons des devoirs que nous impose notre qualité de locuteurs de

l'espéranto... Le devoir de croire qu'aucun peuple n'a le monopole de la civilisation, de la culture ou de l'humanité... Le devoir de croire qu'aucun peuple n'a totalement le monopole de la barbarie, de la perfidie ou de la stupidité... Le devoir de conserver la prudence même au milieu des influences oppressantes des masses populaires... La parole est maintenant au canon, mais son tonnerre ne durera pas éternellement. Lorsque des centaines de milliers d'hommes coucheront dans les tombes militaires et lorsque les ruines chez les vaincus et les vainqueurs attesteront plus des progrès techniques que moraux de notre civilisation, alors on parviendra à

suite...

...Ideo ligita...

de la Persa registaro ĉe Ligo de Nacioj, pioniro de kooperativismo kaj de radioĵurnalismo per mallongaj ondoj, fondinto de Radio Ĝenevo. Li multe aktivis sur diplomata tereno kaj defendis sendependiĝon de Pollando. Leginda estas lia libro *Aventuroj de pioniro* en kiu li rakontas interparoladojn kun la filozofo de pragmatismo William James, kun prezidentoj de Usono Thomas Wilson kaj Theodore Roosevelt, kun Clemenceau, kun Gandhi, pri kiu li verkis biografion en Esperanto, kun Romain Rolland, kun la fame konata angla ĵurnalisto William Stead, kiu mortis en la katastrofo de Titanic, ktp. Grava franclingva verko aperis en 1991 sub titolo *La pensée et l'action d'Edmond Privat*.

John Ronald Reuel Tolkien (1892-1973), la fama angla sciencfikcia aŭtoro de *La mastro de la ringoj* lernis Esperanton ĉirkaŭ la jaro 1907, do ĉirkaŭ 15-jara. Li diris foje ke li *tiam sufiĉe multe legis en ĝi* kaj, en 1932: *Mi konsilas al ĉiuj kiuj havas tempon aŭ emon okupiĝi pri la internacilingva movado: subtenu lojale Esperanton.*

Géza Bárczi (1894-1975) estis la plej eminenta hungara lingvisto kaj fariĝis membro de la Hungara Sciencakademio. Esperanton li lernis en gimnazio ĉirkaŭ la jaro 1908, kaj jam dudek-jara li aperigis tradukon de kelkaj scenoj de *La tragedio de l' homo* de Madañ. Li agnoskis ke la facileco de Esperanto vekis lian intereson pri

lingvoj kaj donis al li konsiderindan avantaĝon por lerni ilin: *Esperanto bezonas dekonan penon kompare kun aliaj lingvoj, kaj ĉar ĝenerale nur la lernado de la unua fremda lingvo estas malfacila, tiu malfernas la pordon al la aliaj.*

Mondkonata speleologo, aŭtoro de dudeko da fakaj libroj aperintaj en pluraj lingvoj, **Leander Tell** naskiĝis en 1895 en Norrköping, Svedio, kaj mortis en 1980. Du el liaj popularsciencaj libroj, *La bela subtera mondo* kaj *Estiĝo de la tero kaj de la homo*, estis originale verkitaj en Esperanto. En svedlingvaj broŝuroj pri grotjo li aldonis resumon en Esperanto. Li fariĝis Esperantisto jam en 1908, do 13-jara, kaj fondinto de la Esperanto-Klubo de Norrköping.

Daŭrigota

...Un appel...

une solution, et alors, malgré tout, les relations internationales s'établiront à nouveau, car au-dessus des nations, il y a cependant quelque chose. Si sur les ruines actuelles nous voulons construire une nouvelle maison, nous aurons besoin de ces travailleurs que n'effraieront pas les difficultés de la reconstruction.

« Nous, espérantistes, soyons l'embryon de ces élites. Pour accomplir dignement notre devoir, conservons notre idéal et ne nous laissons pas abattre par le désespoir ou le regret. »

Il est à noter que, durant la Première Guerre mondiale, à l'initiative d'Hector Hodler, l'Association mondiale d'espéranto accomplit 200 000 services dans l'établissement de relations entre des victimes de la guerre par la transmission du courrier et parfois sa traduction, sans compter d'autres actions d'entraide.

Remarques : Des espérantophones se mobilisent aujourd'hui pour adapter l'esprit de cet *Appel de Hodler* aux circonstances actuelles. Il a été traduit dès les premières heures des bombardements de l'OTAN en espagnol et diffusé en Amérique latine, puis en finnois et adressé à deux journaux finlandais, ensuite en anglais et diffusé à travers toute l'Australie, en particulier par une radio de Melbourne qui émet en diverses langues dont l'espéranto, puis au Mali par Internet. D'autres initiatives se développent pour faire connaître une source d'information indépendante en langue française — *Le Courrier des Balkans* <balkans@bok.net> — à laquelle participent des journalistes et intellectuels de tous les pays des Balkans, y compris des Serbes. En contact avec des espérantophones de Bosnie, des Français ont participé ces dernières années à des actions de solidarité et ont même été invités à enseigner l'espéranto à Sarajevo et Goražde. [Communiqués de SAT-Amikaro]

La Riverego (Le fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 110 exemplaires. Gratuit pour les membres de la S.Q.E. Autrement, l'abonnement annuel est de 10 \$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopila 110⁰⁰⁰. Senpage por la membroj de E.S.K. Por aliaj, la jara abono kostas 10 CAD. UEA-kodo de la Societo : kebk-d.

Échéance pour le prochain numéro / l'indato por la venonta numero : 1999.06.01.

Rédacteur / redaktis : Sylvain Auclair. Ont collaboré à ce numéro / kunlaboris al ĉi tiu numero : Suzanne Bolduc, Michel Clément, Normand Fleury kaj Zdravka Metz. Administrateurs de la S.Q.E. / estraranoj de E.S.K. : Normand Fleury (président / prezidanto), Sylvain Auclair (vice-président / vicprezidanto), Jessy LaPointe (secrétaire-trésorier / sekretario-kasisto), Zdravka Metz kaj Yvon Roux.

Esperanto-Societo Kebekia / Société québécoise d'espéranto

6358-A, rue de Bordeaux

Montréal Québec H2G 2R8

Répondeur et télécopieur / telefonrespondilo kaj telekopiilo: (514) 272-0151

LaRiverego@esperanto.nu

<http://www3.sympatico.ca/esperanto>

Tridek jaroj de Esperantista agado

Zdrakva Metz a commencé sa vie espérantiste par un voyage de la Croatie à la Hongrie, à l'été 1968. Cela fait donc plus de trente ans. Entre autres voyages espérantistes, elle est restée trois mois au Japon, et s'est installée au Québec, où elle a cofondé la Société québécoise d'espéranto, dont elle est de nouveau administratrice. Mais c'est son premier congrès jeunesse, en 1970, à Graz (Autriche) qui lui a donné la piqûre.

Zdravka, vi jam 30 jarojn agadas por Esperanto. Pri kiuj okazaĵoj aŭ pri kiu momento vi tuj pensas ?

Kompreneble mi bone memoras kiam mi eklernis Esperanton. Preskaŭ tuta mia klaso lernis ĝin ĉar nia profesorino de matematiko instruis la internacian lingvon kaj multaj amikinoj havis problemon kun matematiko. Mi ŝatis matematikon kaj mia patro, kiu jam konis la lingvon kaj la ideon, stimulis min rakontante al mi kelkajn anekdotojn rilate Esperanton.

Kio signifis komence la internacia lingvo por vi ?

Mi naskiĝis en Kroatio, kiu tiam estis parto de pluretna kaj plurlingva ŝtato. Krome, la urbo Varaždin, kie mi vivis, troviĝas proksime de la hungara kaj aŭstra landlimoj, kaj ne tro fore de Italio. Jam tre juna mi konsciis, ke mia lingvo ne apartenas al la « grandaj » lingvoj kaj, se mi ŝatus transiri landlimon, mi devas lerni aliajn lingvojn. Pri vojaĝoj mi aŭskultis de patro kaj onklo kaj de vojaĝemaj Esperantistoj, kiuj en klubo montris fotojn, lumbildojn aŭ rakontadis lingvajn komikajn miskomprenojn ; tio certe influis min. Do, por mi, ankaŭ Esperanto estis lingva pasporto por vojaĝoj.

Ĉu vi memoras vian unuan vojaĝon ?

Kompreneble jes. Tuj post la fino de la kurso, mi estis invitita de korespond-amikino en Hungario. Komence de aŭgusto 1968, mi forvojaĝis sola kaj restis ĉe ŝi dum unu semajno. Estas ŝi, kiu interpretadis al mi ĉion krom pri la tiama politika situacio en Ĉeĥoslovakio, kiu ja ĝuste en tiuj tagoj estis invadita. Kiam mi revenis hejmen, miaj gepatroj sopiris mian revenon, ĉar

ili timis, ke nia lando fermos landlimon.

Se vi devus rapide mencii aliajn vojaĝojn, kiujn vi aparte memoras ?

Nerforgesebla estis Graz (Austrio) — la unua IJK ; vojaĝo al Chester en Britio, kiel gvidantino de infanoj, kiuj lernis Esperanton. La plej fora vojaĝo estis trimonata restado en Japanio, kaj nature mia alveno en Kebekion.

Kiujn aliajn landojn vi vizitis ?

Kiam iu vivas en Eŭropo, la proksimeco de landoj kaj kono de Esperanto faciligas vojaĝadon. Mi vojaĝante lernis geografion de : Germanio, Greklando, Bulgario, Britio, Austrio, Hungario, Ĉeĥio, Slovakio, Finnlando kaj Italio. Krome mi vizitis kelkajn urbojn en Svislando, Pollando, Belgio, Francio, Nederlando, Turkio (pli ĝuste nur Istambulon mi konas) kaj flughavenon de Moskvo.

Kiam vi entuziasmiĝis por Esperanto ?

De la komenco mi havis intereson por internacia lingvo, sed kiam mi partoprenis mian unuan IJK-n en 1970, tiam mia koro « verdiĝis ». Mi konsciis praktikecon spertante simplajn homajn kontaktojn kaj komprenis la grandecon de la lingvo kaj ĝian ideon. Ni estis ĉirkaŭ 300 gejunuloj el 26 landoj kaj kvar kontinentoj, kiu interparoladis, ridis, ludis, kantis, amuziĝis sen lingvaj baroj. La mondo estis nia. Por la unua fojo mi amikiĝis kun Japanino, parolis al Afrikano.

Kion vi faris post la kongreso ?

Tuj reveninte en Varaždin-on, mi petis permeson de mia profesorino, ke mi gvidu Esperanto-kurson. Mi konsciis mian neperfektecon en la kono de la

lingvo, sed mi kredis ke mi nepre devas transdoni al kursanoj tiun « verdan energion ».

Samtempe en nia klubo mi iniciatis grupon MoZoMoA (estas la komencliteroj de niaj nomoj) kaj kiel grupo ni organizadis monatajn renkontiĝojn kun aliaj kluboj aŭ semajnajn lokajn aktivecojn : ludo, danco, ni ja havis 18 jarojn. Jaron poste mi foriris Zagrebon por studi kaj tuj mi aliĝis al Studenta Esperanto-klubo kies membrojn mi jam konis. Kun ili mi travivis « kroatan printempon », studentan strikon en oktobro 1971, kaj lernis pri relativeco de politiko. Ni grupe montgrimpadis, vizitis kinejojn aŭ teatrojn, organizis prelegojn kaj dancojn, kantadojn kun unu botelo da vino, helpis dum PIF (Pup teatra Internacia Festivalo), organizis amuzajn novjarajn festojn, aktoradis foje en drama sekcio, planadis vojaĝojn al kongresoj aŭ semajnfinajn

sekvo...

Ventes record

La librairie de l'Association mondiale d'espéranto, à Rotterdam (Pays-Bas) a vendu en 1998 pour la somme exceptionnelle de 297 165 florins, soit 14 p. 100 de plus que l'année précédente. Ce succès est en dû entre autres aux Journées Portes ouvertes, et à des offres régulières aux membres des pays à devises faibles, aux délégués et autres groupes-cibles. Le résultat serait sans doute bien meilleur si un manque de ressources humaines ne retardait pas l'édition d'un catalogue à jour.

L'auteur le plus populaire est de nouveau William Auld, avec trois titres : *Pajleroj kaj stoploj*, et ses traductions de Tolkien (*Le retour du roi*, 3^e partie du *Seigneur des Anneaux*) et de Doyle (*Le chien des Baskerville*, de la série *Sherlock Holmes*). [Selon *Gazetaraj komunikoj de UEA*, n° 28].

...Tridek jaroj...

renkontiĝojn. Ni ridis kaj foje ploris kune, ni dividis simple nian junecon. Eĉ nun kiam mi revenas Zagrebon kaj kiam mi renkontas iun aŭ alian, tiu ĝojo plu vivas.

Ĉu vi grupe iris al Esperanto-kongresojn ?

Mi kelkfoje iris duope aŭ triope kaj aliajn mi renkontis dum la kongreso. Ĉiu de ni ŝatis travivi ion alian. Nur krokodilantoj estis kune, sed ni preferis esperantumi.

Kiom da kongresojn vi partoprenis ?

Ho, bona demando, mi ne preparis statistikon, sed mi provu : IJK — 1970-Graz, 73-Sarajevo, 76-Tesaloniki, 78-Veliko Târnovo, 80-Rauma, 88-Zagrebo, 90-Playa Girón, 92-Montrealo kaj 98- Rijeka : UK — 1973-Beogrado, 76-Ateno, 78-Varna, 90-Havano ; 2 kongresoj en Japanio — landan kongreson en Kôbe kaj en Sapporo kongreson de Hokaidaj Esperantisoj ; kongresojn de KEA en Frederiktono en 1982 kaj en Otavo en 1986 ; ELNA-kongreson en Hartford en 1993 ; la kvin OKEMO-renkontiĝojn kaj ĉiujn renkontiĝojn de ESK.

Vi jam organizis multajn Esperanto-eventojn ; kiu restis aparte memorinda ?

Le Service mondial de correspondance est revenu en 1998 à son rythme normal, avec 419 requêtes. Les années précédentes avaient vu des nombres records de 579 (en 1996) et 550 (en 1997) demandes de correspondants.

Des espérantistes de plus de 50 pays (en premier lieu la France, puis le Brésil, la Russie, l'Iran, Cuba et Madagascar) ont tenté d'obtenir des correspondants. Trois nouveaux pays se sont ajoutés à la liste en 1998 : les Comores, l'Ouganda et la Zambie. [Selon *Gazetaraj komunikoj de UEA*, n° 27]

La IJK en Montrealo daŭris dum tuta semajno kaj ni ok en LKK komencis organizi ĝin du jarojn antaŭe. Ni renkontiĝadis unu-foje monate kaj tiu laboro proksimigis nin. Ni volis, ke la kongresanoj spertu Kebekion kaj ni sukcesis tion. Ankaŭ por mi estis neforgesebla tag-nokto ĉe Indianoj, aŭ acersiropa sezono prezentita en aŭgusto kun veran neĝon. Ni ja pruvis, ke ia ajn ideo realigeblas se ekzistas bonvolo kaj amo por ĝi. Dum la ferma spektaklo ni eĉ trinkis ĉampanon donacitan de la tiama germana konsulo, kiu venis viziti kaj saluti nin, ĉar li legis en gazeto pri la IJK en Montrealo. Memorinda restas ankaŭ ĝojo kun kiu okdeko de gejunuloj revenas al siaj landoj kaj kontinentoj. Foje mi ŝatas revidi vidbendon pri IJK en Montrealo por mem miri al programeroj.

Kiom da aliaj eventoj vi organizis, ĉar ŝajne organizado ja estas via forta flanko ?

Por ke io okazu, oni devas plani kaj organizi. Mi ŝatas grandan familion, do mi ofte aŭ kiel oni diras al mi ĉiame ion organizadas, mi dirus kunorganizas, aŭ iniciatas organizon. Ĉiu organizo postulas tempon kaj homforton, estas ja, pli facile kiam ni dividas laboron. Do, por ke mi respondu — eble dek Esperanto-grupoj, kaj verŝajne duoble tiom da renkontiĝoj. Eble mi nomu kelkajn eventojn ĉar tio foje donas ideojn al aliaj simile fari: vintra ski-semajnfino, someraj renkontiĝoj de ESK, vizitoj al Otavo en februaro kaj dum tulipoj floris, geedziĝfestojn, naskiĝtagojn, kursojn.

Kiujn taskojn vi havis ?

Multfoje kursgvidanto, aktorino, leganto por aŭdkasedoj por blinduloj, kasistino de Kroata Esperanto-Ligo, sekretariino de Jugoslava Esperanto-Ligo, komitatano de TEJO por regiona agado, sekretarikasisto de ESK, nuna konsilanto de ESK, patrino, vivprotokolanto de pluraj Esperantisoj por la libro *Vivprotokoloj*, respondeculo pri

la libroservo de KEA, redaktoro de Alumeto... Ĉu mi ion forgesis ??? Sciu ke tridek jaroj estas duoblo de la aĝo de mia filo. Pensante pri mia vivo kaj pri memoroj kiujn mi havas — krom kun familianoj, miaj travivaĵoj estas ligitaj kun Esperanto. En Esperanto-movado mi renkontis tiom da interesaj personoj, kiuj normale influis ankaŭ mian pensmanieron. Tio, kio ĉiam allogis min al Esperantisoj, estas la grandegaj komprenemo, toleremo kaj respekto, kiujn posedas preskaŭ ĉiuj. Jes, foje vi renkontos strangulon, certan ekstremiston aŭ dogmece orientitan personon, sed ili estas tamen unuopuloj kaj oni ĉiam povas eviti ilin. Jam renkontante iun alian, mi dirus larĝanimulon, mi pravigas mian fidelecon al ĉi-movado. Ĝi ja estas ankaŭ mia privata, familia, ĉiutaga kaj vera vivo.

Kiun konsilon vi donus al komencantoj ?

Al miaj kursanoj mi ripetas, ke korespondado estas bela vojo, ĉar tio estas aparta, homa kontakto, kiu certe larĝigas viajn horizontojn. Esperanto ne estis elpensita por resti hejme kaj paroli kun najbaro. Tre verŝajne korespondado kreos en vi la deziron viziti la personon kaj la landon aŭ eble renkontiĝi dum iu Esperanto-evento. Homoj, kiel sociaj estaĵoj, emas al grupiĝo, ĉu familia, ĉu samopinia. Ĉiu renkontiĝo estas interŝanĝo de certaj valoroj. Krome, legado estas same bona vojo kaj feliĉe sur ĉi-kontinento kie ne abundas Esperanto-renkontiĝoj kaj ja estas malproksimecoj, homoj ŝatas legi. En la Esperanto-movado ĉio dependas de vi, kion vi volas, kion vi serĉas. Ĉio eblas ĉar neniam baroj ekzistas. Tamen, estas al vi fari unuan paŝon kaj kion vi volas.

Kio estas via sekva projekto ?

Vi scias, ke Normandon mi ekkonis dum IJK en Finnlando kaj ni plu uzas Esperanton kaj niaj infanoj lernis ĝin

sekvo...

La projekto Indiĝenaj Dialogoj

Sylvain Lelarge

Pourquoi ne pas utiliser la facilité et la neutralité de l'espéranto, alliées à l'efficacité des nouvelles techniques de communication, pour créer un réseau mondial des peuples autochtones ? C'est le défi que relèveront quelques espérantistes dès mai prochain, date à laquelle aura lieu à La Haye (Pays-Bas) une célébration du centenaire du premier Congrès mondial pour la paix. Ils ont besoin de votre aide.

La indiĝenaj popoloj devis ĉiam batali por siaj rajtoj. En la lastaj jaroj, iliaj organizoj atingis rimarkindajn rezultojn. Sed ankoraŭ estas malmultaj registaroj, kiuj traktas ilin kiel verajn partnerojn. Malgraŭ tio, la indiĝenaj popoloj havas mesaĝon aŭskultendan !

Ne temas nur pri refortigo aŭ respektigo de nacia aŭ internacia leĝaro, kiu ilin protektas. Temas pri la vivnecesa dialogo, kiu nuntempe tiom urĝas inter ĉiuj loĝantoj de nia planedo.

La indiĝenaj popoloj estas la gardantoj de unikaj trezoroj naturaj kaj kulturaj. Ili ankoraŭ estas portantoj de esenca saĝeco kaj gravegaj konoj. La detruo de ilia vivmedio, de iliaj lingvoj, de ilia mondo trafas nin ĉiujn. La jardeko de indiĝenaj popoloj dekretita de UNO (1995-2004) neniel malrapidigas ĉi tiun fatalan spiralmovon.

Por provi inversigi tiun procezon, la indiĝenaj popoloj volas klarigi — sen lasi ian ajn dubon — kiom gravas kaj legitimas iliaj mondkonceptoj. Ili volas agnoskendi iliajn rajtojn je diferenco, kaj je kunvoĉado en la monda koruso.

Nur kreante indiĝenan reton vere internacian surbaze de egaleca interkomunikado eblas tio. Tiucele ili bezonas komunan lingvon! Por la interkulturaj kontaktoj, la indiĝenaj popoloj — pro la enorma diverceco de siaj gepatraj lingvoj — grandparte dependas de tradukistoj kaj interpretistoj. Tio signifas perdon de granda monsumo, tempo kaj precizeco. Uzi ponto-lingvojn (kiel la anglan, francan, hispanan, rusan, araban aŭ ĉinan) nur kreskigas la dependecon, favorante la ekskludon de granda parto.

En la nunaj cirkonstancoj, ofte la indiĝenaj delegitoj renkontas nur tiujn, kiuj parolas siajn ponto-lingvojn.

Kiel do povus helpi ni?

La projekto ID (*Indiĝenaj dialogoj*) celas doni al la indiĝenaj organizoj rimedon por libere kaj senpere kunlabori. La kombino de Esperanto kaj de la aktualnivelaĵoj de teknikoj de instruado kaj de komunikado

ebligu rapidan kaj daŭran sukceson.

La tut-unua paŝo

En majo 1999, la centjariĝa festo-evento de la unua *Monda Konferenco por la Paco* okazos en Hago (Nederlando). Ĉeestos proksimume 30 reprezentantoj de indiĝenaj popoloj. Ili havos gravan rolon, ĉar la ĉeftemo de la diversaj kunvenoj estos kiel internaciaj interkonsentoj — pri edukado, sano kaj mediprotektado — kontribuos al pli paca mondo. Por povi starigi tian komunan strategion, kiun ili sekvente povos prezenti al la publiko, la indiĝenaj reprezentantoj kune pasigos la tri antaŭajn semajnojn lernante: flue paroli kaj skribi Esperanton; utiligi la elektronikan poŝton por resti en kontakto; enkonduki al siaj hejmaj kolegoj la uzon de la ĉi-supraj kapabloj.

En 2004, la indiĝenaj popoloj povus esti formintaj solidan reton de proksimume 200 organizoj flue komunikantaj inter si kaj forviŝintaj sian izolecon; kreintaj Indiĝenajn Unuiĝintajn Naciojn, kiuj akceptigus kaj respektigus la rajtojn de la indiĝenaj popoloj de la mondo; instruintaj unu la aliajn dank'al Indiĝena Interkultura Universitato kiel, ekzemple, savi sian lingvon, respektigi traktatojn, protekti siajn intelektajn propraĵojn aŭ resanigi sian naturan medion.

Kiu partoprenos en la unua kurso? Reprezentantoj de la jenaj popoloj: Tinglita (Alasko), Japuka (Siberio), Aŭstrali-aborigena, brunka (Kosta-Riko) fanta (Ganao) kaj mapuĉea (Ĉilio kaj Argentino). Multaj aliaj popoloj esprimis sian intereson, interalie la Maoria, Keĉua, Gviĉ'in, Lakota, Bri-bria, Hopia, Lumbea, Seminola, Havaja, Majaa, Gvatemala, Jakia, Kuna, Inuka, Samoa kaj Ajnua.

Ĉu fascina projekto? Jes ja, ĉar ĝi estas vere avangarda, plenpotenca kaj perfekte realigebla. Vi povas partopreni en ĝi: enirante la vizon kaj dividante ĝin; kontaktigante nin kun aliaj laborantaj en la sama direkto; ebligante, ke via entrepreno sponsoru la projekton; prezentante al ni

eblajn sponsorojn; adoptante unu el la kursanoj pagante ties kostojn por unu aŭ pliaj tagoj; helpante nin krei strukturon por uzo de Interreto (hardvaroj, softvaroj, provizantoj kaj TTT-paĝo) kiu donos al la projekto radikojn kaj flugilojn; helpante pagi la flugbiletojn de la partoprenantoj, k.t.p. Se la neindiĝena mondo sin engaĝos financi la plejparton de ĉi tiu projekto, tio estos signo, ke la tempoj ŝanĝiĝis. La kostoj de la unua fazo estas proksimume 150 000 USD, el kiuj la *Lern- kaj Lingv-Instituto Narwal* provizos je kvinono.

Ĉi tiuj informoj estas haveblaj en la angla, franca, hispana, nederlanda kaj Esperanto, ĉe Bessie Schadee <bessie.schadee@usa.net>.

...Tridek jaroj...

nature. Mi havas certan sperton en plurlingva edukado kaj mi scias pri graveco de libroj, facilaj kaj interesaj tekstoj por infanoj. Kiam okazis ĉe ni diverspecaj amuzaj aŭ foje dram-aspektaj situacioj, mi notis ilin Esperantlingve, kun la celo liberigi emociojn. Kiam grupo Denask skribis al Normando pri radio-kasedo de infanaj rakontoj, mi provlegis miajn rakontojn kaj sendis al ili. Jaron poste eldoniĝis unua laserdisko kaj tiuj rakontoj estis registritaj. Lastsomere mi legis en norvega Esperanto-revuo pri tiuj infanaj rakontoj kaj estis ideo noti kaj eldoni ilin. Tiam mi komencis pensi, relegi kaj prilabori ilin, ke libro vere aperu ĉar ili ja ekzistas. Jen tio estu donaco al ĉiuj etaj infanoj kiuj havas ŝancon tiom frue koni ĉi lingvon.

Ĉu viaj infanoj nun perfektas en Esperanto?

Ne, mi ne povas tion jesi, ĉar eĉ mi ne perfektigis mian konon de la lingvo.

sekvo...

La Riverego 5

Sciu : kiam oni movadas, organizas, informadas, gvidas bazajn kursojn kaj krome havas familion, ne restas al oni multe da tempo por legado kaj perfektigo. Eble eĉ tio ne estis mia celo ĉar bona Esperanto iel sufiĉas por gravaj homaj kontaktoj. Do, tiun bonan nivelon mi deziras al miaj infanoj kaj estas nun al ili kiom da tempo kaj emo ili metos en ĝia plibonigo. Ili ja estas en fazo kiam komputilo pli gravas ol libro. Ili ĉeestis IJK-on lastsomere kaj ili bone povis interparoli. Mi kredas, ke internaciaj situacioj kun gejunuloj, kiujn ili ŝatas, kaŭzos plian intereson. Ni maljunuloj kun niaj rakontoj ne tiom interesas ilin. Ili ŝatas multe ludi, ridi, salti. Mi memoras ĝojon de mia filino post ludado du-hora en baseno kun grupo de gejunuloj dum OKEMO.

Jes, interesigi siajn samlernejanon por Esperanto, estas ia nerealigita mia revo. Sed, eble vi ne demandu plu, ĉar tiu interparolado fariĝos ne nur simpla artikolo sed rakonto.

Dankon al vi kaj mi deziras ke tiu via lasta revo, junuloj en Montrealo, realiĝu kaj ke vigliĝu nia movado. Junuloj, ja estas la estonto de la movado.

L'espéranto et l'Amour

Dans le cadre de la Société régionale d'Exploration de la Région de l'Amour, une réunion s'est tenue à Vladivostok, le 18 juillet dernier, pour fêter le 90^e anniversaire de l'Association mondiale d'espéranto et le 60^e de l'Association mondiale de la jeunesse espérantiste. Ce rendez-vous, auquel participait un espérantiste japonais, a fait l'objet de reportages de deux chaînes de télévision et de deux journaux régionaux. Rappelons que l'Amour est le fleuve dont une partie délimite la frontière entre la Russie et la Chine. [SAT-Amikaro, Service de presse, n° 533, août-sept. 1998]

Refleksiva demando

Mi ankaŭ havas demandon por la gramatika rubriko. Tio estas la vorto *si*. Mi plejparte komprenas kiel uzi ĝin, sed mi ne scias kelkajn detalojn. Jen ekzemploj :

1) La viro kaj lia edzino iris al la hospitalo por viziti ŝian patrinon (tiun de la edzino).

2) La viron iris al la hospitalo kun lia edzino por viziti ŝian patrinon.

3) La viro kaj lia edzino iris al la

Bruce Arthur
hospitalo por viziti sian filon (la filo de la viro kaj de lia edzino).

4) La viro iris al la hospitalo kun lia edzino por viziti sian filon (aŭ ilian filon ?).

Ĉu mi uzis la vortojn *lia*, *sian* kaj *ŝian* ĝuste ? Krome, kiam oni uzu la vorton *ties* ?

Mi trovas *La Riveregon* tre interesa kaj mi ĝuas legi ĝin. Plu faru la bonan laboron.

Respondo

Sylvain Auclair,
kun helpo de Bertil Wennergren

La frazoj 1 kaj 3 estas tute ĝustaj. En la unua, oni ne diru *sian patrinon*, ĉar *si* signifas la tutan subjekton, en tiu ĉi kazo : *La viro kaj lia edzino*.

En la frazoj 2 kaj 4, oni devas skribi : *kun sia edzino*, ĉar temas, verŝajne, pri la edzino de l' subjekto, ne pri tiu de alia viro... Kaj, koncerne la demando ĉe la kvara frazo, ambaŭ finoj (*sian filon / ilian filon*) estas ĝustaj, ĉar temas pri tute la sama homo, ĉu ne ?

Fine, kiam oni uzu *ties* ? Tiun tabelvorton oni povus konsideri kiel la malon de *si*. Kaj oni memoru, ke ĝi

paralelas kun *tiu*. Oni plej ofte uzos la tabelvortojn *ti-* en kazoj, kiam oni ne jam aŭ ĵus priparolis la aluditon homon aŭ objekton. Konsideru la jenan frazon : *Rigardu tiun mantelon ; ĝian koloron mi tre ŝatas*. Sed, se vi simple **montras** du mantelojn, vi povus diri : *Ties koloron mi pli ŝatas ol ĉi ties*.

Krome, iuj emas uzi *ties* por anstataŭigi *lia / ŝia*, kiam la sekso de la posedanto estas negrava aŭ nekonata : *Rigardu kiel fuŝis la riparisto ; ties kapablo certe estas malgranda*.

Histoire

Après avoir constaté la difficulté de trouver des documents concernant le mouvement espérantiste en Amérique du Nord, un espérantiste québécois, Michel Clément, collaborateur régulier de *La Riverego*, propose de fonder une société internationale d'historiens espérantistes. Cette société pourrait en premier lieu utiliser les ressources d'Internet. C'est d'ailleurs par ce réseau que Michel tente actuellement de trouver des personnes intéressées à son idée. Bonne chance, Michel !

Un train nommé Espéranto

Depuis le 24 mai dernier, le train 1622 des Chemins de fer roumains (CFR), qui assure la liaison entre Bucarest et Sibiu, porte le nom *Esperanto*. Comme pour huit autres réseaux nationaux, les explications de tableaux horaires des CFR sont aussi en espéranto. [SAT-Amikaro, Service de presse, n° 533, août-sept. 1998]

RAVI kion ?

Normand Fleury

Verŝajne vi ne aŭdis pri RAVI. Ĝi estas franca mallongigo por « Reto da volontulaj interpretistoj ». La fako pri interkulturaj rilatoj de Montrealo starigis inter siaj dungitoj, reton da interpretistoj. Montrealo, ja ne plu estas ĉefe dulingva kiel antaŭ duona jarcento. La montreala loĝantaro parolas pli ol 175 diversajn lingvojn. Kaj jen, ofte estas situacio, kiam necesas traduki au interpreti inter civitanoj kaj la urba registaro. La montreala

registaro dungas tradukistojn kaj interpretistojn por la franca kaj angla lingvoj sed ofte spertis lingvajn barojn kun civitanoj kiuj ne scipovis tiujn du lingvojn. La reto da interpretistoj nun ebligas aldoni 22 novajn lingvojn kaj inter ili estas Esperanto. Jam dufoje oni petis min traduki leteron ricevitan ĉe la urbestra oficejo. Mi do fieras ke inter la « oficialaj » lingvoj akceptitaj de la interkultura fako troviĝas ankaŭ Esperanto.

RAVI quoi ?

Normand Fleury

Vous le savez, Montréal est devenue un centre urbain multiculturel dont les habitants parlent plus de 175 langues. Pour s'adapter à cette réalité, et surtout pour favoriser la communication entre ses employés et sa clientèle ne parlant ni français ni anglais, la Ville de Montréal a créé en 1996 le RAVI (Réseau d'aide volontaire d'interprètes). Le service s'étend à l'ensemble de la ville. Il est formé d'employés municipaux

qui offrent leurs services, de façon ponctuelle et bénévole, à titre d'interprètes ou de traducteurs à leurs collègues de travail. La Division des affaires interculturelles assure la coordination du réseau. Grâce à la contribution des membres actuels, le RAVI peut répondre à une demande d'interprétation et de traduction dans 22 langues dont l'espéranto.

Reago pri Ido

Robert Pontnau
Francio

Mi legis vian artikolon *Malmembrigo pro Ido* (*Eventoj*, n^o 157). La *Kebekia Esperantista Junularo Organizo* havas vere humuron opiniante, ke « laboro por Ido ne estas laboro kontraŭ Esperanto », aŭ eble tutsimple ĝia estraro ne legis la lastan numeron de *Progreso* (n^o 314 septembro-decembro 1998, pĝ.10). Ĝi trovis tie la artikolon *L'angla ed interlinguo* de James Chandler kaj jenan frazon, kiu klare resumas tiun temon : « L'angla semblas quale puerludo kompare kun la abundanta intertextita kazoflexioni di Esp(eranto) ». Traduke : « la angla ŝajnas infana ludo kompare kun la abundaj intertekstitaj kazaj fleksioj de Esperanto ». Aŭ ĉu tiu artikolo favoros Esperanton forpelante legantojn de Ido ?

Trois membres de l'**Organisation de la jeunesse espérantiste du Québec** ont célébré à Ottawa la venue du printemps, fin mars dernier. Par ailleurs, un nouveau projet de fonder une club espérantiste dans une école secondaire privée de Montréal va bon train. C'est à suivre...

Letero el Italio

Eble vi memoras mian nomon, ĉar mi abonis *La Riverego* dum du jaroj. Mi estas italo, mi nomiĝas Fabrizio [Pagliaroli] kaj mi multe interesiĝas pri Kebekio, ĝia lingvo, ĝia kulturo, ĝia politiko, ktp. Dank' al Interreto, mi ofte vizitas kebekiajn TTT-ejojn, inter kiuj estas la TTT-ejo *Planète Québec*. Temas (se vi jam ne konas ĝin) pri elektronika magazino kun novaĵoj, diversaĵoj, diversaj rubrikoj, ktp.

En unu el tiuj rubrikoj, kiu nomiĝas laŭ sia redaktisto Gérard Saint-Denis, oni prezentas al la legantoj (per mallonga priskribo), ĉiutage, plurajn franclingcajn TTT-ejojn, pri la plej diversaj temoj, por ke la scivolaj interretanoj esploru ilin. Mi ekhavis la ideon proponi al la redaktisto, ke li eventuale prezentu ankaŭ iun TTT-ejon pri Esperanto. Do mi pensis, ke estas taŭge doni al li la adreson de la TTT-paĝaro de Esperanto-Societo Kebekia, prefere ol tiu de, ekzemple, Francio aŭ Svisio, aŭ ktp-io. Fakte mi vidis, ke vi, ESK-anoj, havas belan, klaran TTT-paĝaron, kun diversaj ligoj al aliaj Esperanto-ejoj, kaj koncizaj kaj tre taŭgaj informoj pri Esperanto kaj ĝiaj celoj.

Do antaŭ kelkaj tagoj, mi skribis al S^{ro} Saint-Denis, proponante, ke li prezentu vian Esperanto-TTT-paĝaron en sia rubriko. Surprize, li respondis al mi hieraŭ, dirante ke li faros tion la venontan 14^{an} de februaro. Jen lia respondo, kiun mi kopias ĉi-sube:

Bonjour...

Merci de la suggestion... et de tes visites sur Planète...

J'en parlerai dans ma chronique du 14 février...

Au plaisir

Gérard Saint-Denis.

La adreso de *Planète Québec* estas jena : <<http://planete.qc.ca/une.asp>>

Kalendaro de venontaj okazaĵoj

- 31^a de marto ĝis 6^a de aprilo. Internacia Junulara Festivalo, en Rimini (Italio).
- 2^a ĝis 5^a de aprilo. Dua **Fromaĝa Semajnfino**. En Pierrefontaine-lès-Blamonts (Francio)
- 24^a de aprilo. Deka **Malferma Tago** de la Centra Oficejo de U.E.A., en Roterdamo (Nederlando). Ĉefa gasto: verkistino Marjorie Boulton (ŝi estas ankaŭ prezidanto de la Rondo Kato).
- 24^a kaj 25^a de aprilo. Internacia Festivalo de Kanto kaj **Kulturo**. En Karlovo (Bulgario).
- 25^a de aprilo ĝis 2^a de majo. TEJO-Seminario, en Torino (Italio). Temo: *Lokaj kulturoj de globala mondo*.
- 7^a ĝis 9^a de majo. Nord-Okcident-Regiona Esperanto-Konferenco (**NOREK**), North Saanich (Brita Kolumbio).
- 13^a ĝis 16^a de majo. **Printempa Renkontiĝo**, en Eijsden/Mesch (Nederlando). Temo: Eŭroregionoj.
- 13^a ĝis 16^a de majo. **Pied-migrado**. En Bouresse (Francio).
- 30^a de junio ĝis 4^a de julio. **FREŜO**: Frusomera renkontiĝo esperantista ŝokanta obstinulojn, en Olštino (Pollando).
- 4^a ĝis 13^a de julio. 39a tendaro **OKSEJT**, en Tihvin (Rusio). Inf: Andrej Ananjin.
- 24^a ĝis 31^a de julio. Kongreso de la **Sennacieca Asocio Tutmonda** en Karlovy Vary (Ĉeĥio).
- 31^a de julio ĝis 7^a de aŭgusto. 84^a **Universala Kongreso**, en Berlino (Germanio).
- 9^a ĝis 16^a de aŭgusto. 55^a Internacia Junulara Kongreso, en Zánka (Hungario).
- 14^a ĝis 21^a de aŭgusto. Renkontiĝo de **Esperantistaj Familioj**. En Zielona Góra (Pollando).
- 26^a ĝis 28^a de aŭgusto. Seminario. **Koboldoj en folkloro**. En Iisalmi (Finnlando).
- 4^a ĝis 10^a de septembro. Sepa Internacia **Turisma Semajno**, Valletta (Malto).
- 10^a ĝis 15^a de decembro. **Zamenhofa semajno**, Bouresse (Francio).

Ni plezure respondos demandojn pri la supraj (kaj aliaj) okazaĵoj: (514) 272-0151 aŭ esperanto@sympatico.ca.

Alvoko pri Lernejo Zamenhof en Bjalistoko

Ni, geinstruistoj de la Elementa Lernejo n^o 23 je la nomo de Ludoviko Zamenhof en lia naskiĝurbo, Bjalistoko, ekzistanta de la 1959^a jaro, kiam okazis ĝia solena inaŭguro, en kiu partoprenis multaj geesperantistoj — partoprenantoj de la Jubilea UK el la tuta mondo, petas vin helpi savi nian lernejon.

Ĉi-jare ni festos la 140^{an} naskiĝ-datrevenon de D^o Esperanto kaj ni deziras ankaŭ festi la 40^{an} datrevenon de funkciado de nia lernejo. Bedaŭrinde, nia estraro kaj la bjalistoka urbestro decidis likvidi nian publikan lernejon kaj transdoni nian sidejon al privata, romkatolika lernejo.

Ni opinias, ke en la naskiĝurbo de la kreinto de la internacia lingvo Esperanto ne povas malaperi la sola lernejo portanta nomon de tiu fama bjalistokano. Ne konvinkas nin la oficiala kialo, por kiu ĝuste nia lernejo devas esti likvidita: reformado de pola kleriga sistemo. Laŭ nia opinio tiu decido estas intenca politika agado de lerneja estraro kaj la urbestro de Bjalistoko.

Ni akcentas, ke danke al niaj geinstruistoj kaj al nia lerneja junularo disvastiĝis rondo de nomoj interesigitaj pri popularigado de la internacia

27^a de junio ĝis 2^a de julio de 2000. 10a Internacia Esperanto-Kongreso, en Istanbul (Turkio)

11^a ĝis 18^a de julio. 85a Universala Kongreso, en Tel-Avivo (Israelo).

13^a ĝis 20^a de aŭgusto 2000. **Kultura Esperanto-Festivalo**, Finnlando.

Somero 2000. 56^a Internacia Junulara Kongreso, verŝajne en Honkongo.

Somero 2001. Universala Kongreso, en Zagrebo (Kroatio).

Ni organizas

23^a de aprilo. Kluba renkontiĝo ĉe Daniela, Ivano kaj Rumen, 7122, rue Fabre, app. 1 (metrostacio Fabre), (514) 722-8758.

Temo: *aliaj planlingvoj*: lojban, la logika lingvo. 19h30.

2^a de majo. Kluba renkontiĝo en la Montreala Esperanto-Domo (6358-A, rue de Bordeaux). Temo: *Diversaj tekstoj en Esperanto*. 19h30.

18^a de junio. Kluba renkontiĝo ĉe *Café espéranto* (250, av. du Mont-Royal Est). Konkurso de *tablofutbalo*. Temo: *viaj preferitaj kafejoj kaj restoracioj en Montrealo*. 19h30

29^a de aŭgusto. Kluba renkontiĝo ĉe *Café espéranto*. **Matenmanĝo** je la 10a horo; {diskuto} pri *memorajoj pri la lastaj someroj, inkluzive ĉi-lastaj*, ekde la 11^a horo.

24^a de septembro. Kluba renkontiĝo, en la Montreala Esperanto-Domo. Temo: *serĉoj en Esperanto, kaj sociaj ludoj*. 19h30.

9^a ĝis 11^a de oktobro. Aŭtuna renkontiĝo en **Okemo** (Ludlow VT).

19^a de novembro. Kluba renkontiĝo en la Montreala Esperanto-Domo. Temoj *ne* politically correct-aj: *mortpuno, abortigo, rilatoj inter Kebekianoj pradevenaj kaj novdevenaj, progreso aŭ malprogreso de Esperanto*. 19h30.

18^a de decembro. Zamenhofa festo.

lingvo. En la urbo, en kiu naskiĝis la kreinto de Esperanto almenaŭ en unu lernejo devas esti instruado de la lingvo.

Ĝis nun en nia lernejo estis gvidita sistema informado pri la vivo kaj la agado de la kreinto de Esperanto kaj ankaŭ pri la lingvo, kaj pri ideo de esperantismo. Ĉiuj infanoj, kiuj deziris, havis eblecon eklerni senpage la lingvon. Multaj artikoloj en loka gazetaro povas dokumenti tion.

Kune kun likvido de nia lernejo finiĝos la populariga agado pri la lingvo kaj esperantismo inter bjalistokaj infanoj kaj junularo.

Ni petas ĉiujn geesperantistojn pri helpo kaj perado ĉe ĉiuj bjalistokaj ŝtataj, lokaj, urbaj kaj vojevodaj aŭtoritatoj por ke, la lernejo je la nomo L. Zamenhof ne malaperu el bjalistoka lerneja mapo.

Ni anticipe ege dankas pro via helpo kaj subteno — 46 geinstruistoj el la lernejo.

Se vi povas transdoni nian informon al viaj gekonatoj.

Se vi deziras helpi al ni bonvolu sendi retleterojn al: Urbestro de Bjalistoko / urbestro de Bjalistoko S^o Ryszard Tur: <city@cksr.ac.bialystok.pl>, <bpm@city.bialystok.pl>. Kaj por ke ni sciu pri viaj leteroj al: <spnr23@polbox.com> [El Interredaktore].